



LIBERPENSULA ANGULO

Dokumentoj pri la Morta maro.

Nia generacio havas multe pli da facile por lerni la tutmondan historion ol la homoj de la 19-a jarcento. Dank' al la nove eltrovitaj dokumentoj oni pli konkrete konatiĝas kun la antikvaj civilizoj, kio malfermas al ni novajn horizontojn. Ni memoru la faman eltrovon de Peliot, 1908, en Tibeto. Budaistaj monaĥoj kaŝis sian bibliotekon en la jaro 1035 sub minaco de invado k ebligis al tiu klerulo ne nur havi precizajn informojn pri la tiamaj lingvoj, sed ankaŭ pri la tuta azia historio. Tie kuŝis 20.000 manuskriptoj.

La lasta eltrovo pri analoga fakto faris sufiĉe da bruoj tra la mondo, ĉar ĝi perturbis la spiritostatadon de la kristanaro. Estas ĉiam riske pritrakti la „Sanktajn Skribojn“, ĉar ni bone scias, ke la biblio estas ia tabuo. La fakto mem, ke homoj ĝin diskutas, pravas, ke ili ne plu estas fidelaj disĉiploj de Jesuo. Ni memoru la famajn motojn: *credo quia absurdum*¹⁾ k la intenco de Dio ne estas diveneblaj. Tamen, pro la progreso de scienco k tekniko en ĉiaj fakoj, la eklezio devis plurfoje re-vizi k modifi sian konduton.

Ni scias, kio okazis en 1896 apud Kairo pri „La skribo de Damasko.“ Ties eltrovo koniganta al ni la vivon de la homoj, kiuj vivis antaŭ kelkaj jarmiloj, ofte ebligis pli bonan komprenon pri la nuntempa homo. Eĉ se tio okazigas danĝerajn malkovrojn, la kleruloj ne devas atenti tion, sed daŭrigi sian laboron.

Pro sama kaŭzo la eltrovo, kiu okazis en 1947 en la dezerto de Judio, faris tiom da bruoj en la religia mondo. Kiel en Tibeto pro minaco de invado, iu juda sekto kaŝis tie sian bibliotekon kun la ideo retrovi ĝin: En printempo 1947 iu bedueno de l' tribo Taĉmare, kiu paŝtis ŝafaron, eniris tute hazarde groton por serĉi perditan beston. Tiu groto troviĝas je du kilometroj de la Morta maro k tri cent metrojn super la akvo-nivelo. Ĝi situas okcidente de tiu maro apud la fonto de la

¹⁾ Mi kredas ĝin, ĉar ĝi estas absurda.

rivero Ain Feŝka k dek du kilometrojn de Jeriĥo. La bedueno sin trovis subite en vasta koridoro, kiu similas al aranĝitaj lokoj. Tie staris argilaj potoj, en kiuj estis kaŝitaj antikvaj manuskriptoj. La pakajoj estis zorge kudritaj k kovritaj per ledo. Multaj potoj estis jam delonge frakasitaj k tiel la kleruloj eksciis, ke la plimulto da manuskriptoj forperdiĝis.

Tiu bedueno, kiu ne komprenis la valoron de tiuj manuskriptoj, volis vendi ilin por akiri iom da mono. Komence li vizitis mahometanan antikvajiston en Betlehemo, sed tiu komercisto rifuzis doni du dek funtojn por ili. Tiam li sin turnis al Siria komercisto, kiu raportis pri tio al diversaj kolegoj en Jeruzalemo. Tiel la novaĵo trafis la Sirian patriarkon M. Anataso Samuel, kiu aĉetis la kvar plej bone konservitajn rulojn. Ĉar li ne komprenis la hebrean lingvon, li petis informojn al iu profesoro kiu respondis ke tio ne prezentas intereson. Fine de la somero la ekleziulo petis informojn al juda komercisto, kiu informis la hebrean universitaton. Tiu lasta tuj sendis du bibliotekistojn. Sed ili ne sentis sin kapablaj por deĉifri la manuskriptojn. Intertempe okazis ribeloj kiuj malfrugis la esploron.

Fine, la 25an de novembro 1947, profesoro Sukenik, ĵus reveninte Palestinon, ekkonis la novaĵon, aĉetis la manuskriptojn k transportis ilin al la juda kvartalo de Jeruzalemo. Post diversaj klopodoj li sukcesis retrovi la tuton. Iom pli malfrue iu el la usona lernejo jeruzalema kopiis k fotis la dokumentojn. Sub preteksto ke okazas ribeloj en la lando, oni transportigis la manuskriptojn al Usono. En tiu lando oni komencis paroli pri tiu afero nur en 1948. La fama Dupont-Sommer, profesoro pri altaj studoj, kiu jam verkis plurajn broŝurojn pri la afero, asertas, ke laŭ la lastaj eltrovoj faritaj en la groto de Ain Feŝka tiuj dokumentoj troviĝis tie jam de du mil jaroj. La afero estas tre delikata, ĉar se la unuaj estas verkitaj en malnova hebreaj lingvoj, la aliaj estas en nov-hebreaj k kelkaj je la fino en aramea.

Ĉar kelkaj kleruloj dubis pri la aŭtenteco de la eltrovo, oni kolektis la pecojn, kiuj postrestis en la groto, k komparis ilin

laŭ tre serioza esploro. Oni rajtas supozi, ke laŭ la potoj kiuj staris tie, ekzistis almenaŭ 250 ruloj. Estas amuze studi tiun aferon, ĉar la teksto de la originalaj manuskriptoj ne ĉiam akordiĝas kun la nunaj. Ni jam vidis kio okazis pri la 'biblio': estiĝis grekaj, arameaj, siriaj k latinaj tradukoj. La oficiala teksto, kiu kuŝas en Romo, estas tradukita de Sanktulo Hieronimo.

En la manuskriptoj de la Morta Maro temas ofte pri iu Majstro de Justeco (Môre Haĉĉedeq), k oni donas al li la titolon: elektito de Dio (Bettir El). Laŭ la juda verkisto Jozefo Flavio temas pri Aristobulo la dua. Laŭ la historio oni enkarcerigis lin en la jaro 63, kiam Pompejo venkis en Jeruzalemo. Ĉi tiu ligis lin al sia ĉaro, kiam li triumfe revenis Romon en 61. Iom poste Aristobulo eskapis k revenis Jeruzalemon. Li denove estis kaptita k mortis pro veneno en malliberejo.

Iu disĉiplo de Aristobulo nomita Hirkan okupis lian postenon. Ĝis nun la portreto de Jesuo tia, kia ni konas lian personon k farojn, tute similas al tiu Aristobulo. Tial okazas konfuzo k tial la afero faris tiom da bruoj inter la kristanaro.

La esperantistoj bone memoras la artikolojn de D-ro Zamenhof pri iu Hillel, juda doktoro kiu verkis la sep regulojn: Metodo por interpreto de la sanktaj libroj, k kiu kunigis la maksimumojn de la malnovaj doktoroj en unu verko, kiu iĝis la bazo de l' Talmudo. Zamenhof intencis starigi unikan religion laŭ la teorioj de tiu alia Jesuo.

Ni baldaŭ legos la sekvon de la manuskriptoj, kiujn oni deĉifras en Usono. Ni ne scias, ĉu ili diros la veron aŭ ĉu ili silentos pri tiklaj punktoj. La ĵurnaloj, revuoj, libroj kiuj jam pritraktis tiun problemon, asertas, ke tio estas vera revolucio. Eble la religianoj plej proksimas la veron, la religian veron! Ili simple diras, ke eĉ se novaj skriboj venus por alporti novan lumon pri Jesuo, tio tute ne gravas. Oni ne povas detrui religion, kiun oni praktikas jam de 2.000 jaroj, pro malnovaj paperaĉoj. Kelkiuj pli kategorie diras, ke eĉ se la vera Jesuo ne ekzistis kiel estas dirite en la sankta biblio, la afero ne gravas, ĉar la Eklezio devas havi la finlastan vorton pri la afero.

Marso.

Aug. Strindberg

La rajto pri propraĵo

En arbaro kreskis bela avelujo. La nuksoj estis maturaj, kiam sciuro venis tien en radiantanta aŭgust-tago.

„Ĉi tiu avelujo apartenas al mi!“ ĝi diris al si mem k saltis sur branĉeton, por praktiki siajn dentojn sur la delikataj fruktoj. „For de ĉi tie, ĉi ŝtelisto!“ eksonis mallaŭta voĉo el la arbusto.

„Kiu estas tie?“ vokis la sciuro k rigardis jen tien, jen reen.

Fine ĝi ekvidis ĉe la piedo de l' avelujo mustelkatinon.

„Iru for de ĉi tie k ne ŝtelu miajn nuksojn!“ ripetis la mustelkatino.

„Viaj nuksoj!“ mokis la sciuro k manĝis senĝene tiom da nuksoj, kiom ĝi ajn povis.

„Ĉesu, ĉi ŝtelisto tie supre!“

„Permesu, se mi rajte demandas, ĉu al vi apartenas tiu ĉi avelujo?“

„Kaŭze de **jus primi ventis**, rajto de l' unue-alveninto, se vi permesas!“

„Tre bone, sinjorino, k mi ĝin havigis al mi kaŭze de **jus primi occupantis**, tio estas, ke mi estas la unua posedanto. Perforto antaŭiras rajton. Mi estas la pli forta, do, al mi decas la prefero, ĉu ne?“

„Kion vi faras ĉi tie?“ babilaĉas nukso-garolo, logita per la bruo.

„Ne prenu miajn nuksojn; se ne, mi atakos vin!“

„Pardonu, sinjoro“, kontraŭparolis la sciuro, „sed mi estas ĵus eltrovinta ĉi tiun arbuston.“

„Ke vi malkaŝis mian arbuston, mi volonte kredas al vi, sed pro kiu rajto vi uzurpis ĝin?“

„Mi ĝin proprajigis al mi pro...“

„Jes, vi tute simple ĝin prenis. Kaj nun mi venas k ĝin reprenas.“

Sammomente, kiam la nukso-garolo volis ataki la sciuron, densa ŝtonhajlo devigis la disputantojn fuĝi.

„Jen la friponoj!“ krias la buboj ĵus alvenintaj por kolekti nuksojn.

„Nun ili nenion ricevos pro sia penado.“

Kaj la buboj ŝirpenas la nuksojn, mstante ilin en la ĉapon.

„Tre gajaj vi estas tie inter la arbustoj!“, murmuris la farmisto, kiu nun estis alveninta sur la spektaklejo. „Permesu, vi sinjoroj ŝtelistoj, ke mi rapide forpelu vin, por ke vi ne havu falsan koncepton pri la propraĵo de l' individuo!“

„Jen belaj vergoj“, interrompis lin la kaporalo, kiu estis alveninta kun sia patrolo k nun eligis sian faŝcintranĉilon. „Jen tio, kion mi nepre bezonas por la faŝinoj!“

„Haltu!“ vokis la farmisto. „Ĉu vi estas eble la posedanto?“ demandis la kaporalo. „Ne, tiu vi ne estas! Do, fermu vian buŝon!“

(Fino sur la lasta paĝo)